

MALGRANDA REVUO

aperas kvaronjare. Prezo 1 kr (inkl. sendkoston), je mendo de minimume 10 ekz. po 0,80 kr. Abono akceptata. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 int. respondkuponoj. Nroj 1/43 kaj 2, 3, 4/44 vendataj por po 0,55 kr. — Stellan Engholm, Skolgatan 9, Ludvika, Svedujo. Poŝtokonto 26 80 23.

PREZO: 1.- Kr.



MALGRANDA

REVUO

N:RO 3

1946

4-a JARO

ENHAVO:

	Paĝo
HENDRIK ADAMSON de Stellan Engholm	1
POEMOJ DE HENDRIK ADAMSON	9
LA PALESTINA PROBLEMO EL VIDPUNKTO DE JUSTECO De J. Kohen-Cedek, Jerusalem	12
ŜTORMO SUPER EŬROPO De G. J. Degenkamp	21
KIEL POPULARIGI LIBROLEGADON? de Einar Hult ...	24
LA ENIGMO DE LA TEMPO De Chr. Heilskov	28

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO

Hendrik Adamson

De *STELLAN ENGHOLM*



En la antaŭa numero de MR mi menciis pri la morto de Hendrik Adamson, poeto estona kaj esperanta. Ekster Estonio certe nur malmultaj konas liajn verkojn, tre multaj ne konas eĉ lian nomon.

Mi ne povas rakonti pri li, kiel mi devus. Pri lia vivo antaŭ 1932 mi scias preskaŭ nenion. Liajn estonajn verkojn mi ne konas, eĉ ne la prijuĝon pri ili. Nun estas malfacile ricevi tiajn informojn. Mi tamen volas rakonti tion, kion mi povas.

En 1932 mi kaj mia edzino vizitis Estonion. Iam ni estis en la hejmo de la fratinoj Dresen. Ni sidis ekstere, kaj ĉirkaŭ ni estis verdaĵo, suno, varmo, kulmino de nordlanda somero. Helmi alportis pakon da paperoj. Ŝi diris, ke estas esperantaj poemoj de estona verkisto, Hendrik Adamson, kiujn li sendis al ŝi por prijuĝo. Antaŭ nelonge kaj memstare li komencis lerni esperanton. Li estas popollerneja instruisto, sed pro ftizo kaj aliaj malsanoj li ne povas labori plu, nur iom verki. Kune kun sia maljuna patrino li

loĝas en dometo ie en la estona kamparo, malproksime de urboj kaj pli grandaj lokoj.

Kelkajn tagojn poste mi skribis al li kaj postrevene ricevis respondon. Tio estis la komenco de daŭra interrilato. Bedaŭrinde ni tiam ne povis viziti lin. Poste ni ne vizitis Estonion.

Mia konatiĝo kun li kaj miaj impresoj de li venas sole el liaj leteroj kaj el liaj verkoj. Ni regule korespondis, kaj la tempo inter la leteroj ne estis longa. Estis simplaj leteroj kun mencioj pri ĉiutagaj aferoj dum la paso de tagoj kaj semajnoj. Foje ni parolis pri literaturo kaj verkado, tamen neniam amplekse. Same ni foje sed neofte skribis pri ideoj, pri la vivo de homoj kaj popoloj, pri la aktuala situacio en la mondo. Li ne estis multvorta, nek mi.

Li kaj la patrino havis malgrandan terpecon, bovinon, kelkajn ŝafojn, kampeton por terpomoj kaj legomoj. Kiel dirite ili loĝis malproksime en la kamparo, ŝajne tre izolate kaj en regiono kun malmulte da loĝantoj. Tre malofte li menciis pri homoj aŭ renkonto kun homoj. Iam li sendis foton de la dometo. Ĝi ŝajnis kaduka. Mia penso iris al tiu monumento pri granda spirito en kadro de mizero, kiun oni povas vidi en Helsinko, la iama loĝejo de la plej granda finna verkisto, Alexis Kivi.

Malsanoj ĉiam ligis lian korpon. En la unua tempo de niaj interrilatoj li foje helpis la patrinon pri la flego de la terpeco kaj aliaj hejmaj laboroj, sed ŝajne tio estis esceptoj. Ofte li pasigis longan tempon en la lito, pli kaj pli laŭ la paso de la jaroj. Foje la patrino estis malsana. Estis malfacile por li tiam zorgi pri ĉio. Ankoraŭ pli malfacile estis, kiam ili ambaŭ estis malsanaj samtempe. Iel ili tamen devis prizorgi la bestojn kaj aliajn necesajn aferojn. Plej malfacile estis, kiam ligno mankis, precipe vintre. Malgraŭ malsano ili devis en neĝo kaj malvarmo iri en la arbaron por havigi brulaĵon. Tio postulis multe da tempo kaj forrabis multe de la malmulta forto.

Iliaj vivkondiĉoj certe estis minimumaj, verŝajne malpli ol minimumaj. La terpeco kaj la bovino donis almenaŭ

parton de la necesa nutraĵo. Li ricevis malgrandan pension, tamen ne sufiĉan por la bezono. Foje li ricevis negrandan verkistan stipendion, foje malgrandan honoraron.

Lia spirito vivis multe pli forte ol lia korpo. Kvankam la fortoj ne sufiĉis por falĉado, lignohakado aŭ terpomrikolto, li tamen povis sidi ĉe sia tablo verkante aŭ legante. Kiam la fortoj sufiĉis eĉ ne por sidado, li tamen verkis kaj legis kuŝante en la lito. Pli ol unu fojon li skribis, kvazaŭ spite: "Sed mi ja povas legi kaj skribi ankaŭ en la lito." Dum tiuj jaroj antaŭ la milito aperis de li tri estonaj poemlibroj. Tio tamen malmulte signifis ekonomie. Estonaj honorarioj estis ege malaltaj. Ofte eldonisto povis nenion pagi.

Dum tiu tempo li ankaŭ lernis la svedan lingvon. Laŭ lia peto mi sendis al li Novan Testamenton, vortaron kaj elementan gramatikon. Ĉar li bone sciis diversajn lingvojn, la lernado rapide progresis. Poste li ricevis kaj legis diversajn svedajn belliteraturajn verkojn. Foje li skribis leterojn svede.

Mi ne scias precize, kiam li komencis lerni esperanton. Certe tio okazis ne longan tempon antaŭ nia konatiĝo, sed ĉiuokaze li jam tiam estis bona esperantisto.

Oni povus supozi, ke por li, mortanta homo, esperanto estus ĉefe tempopasigo en la izoleco. Tiel ne estis. Eĉ la sveda lingvo ne estis por li nura tempopasigo. Li lernis ne nur vortojn, sed li vastigis kaj pliriĉigis sian spiritan mondon. Lia spirita mondo havis firman fundamenton. Rilate al literaturo li plej ŝatis la mondliterature gravajn verkojn.

Esperanto estis por li serioza afero, mi povas diri esenca. Ĝi donis sencecon, enhavon kaj celon al tiu vivo en malsano kaj mizero. Lia interrilato kun la esperantistoj — kvankam rekte nur kun tre malmultaj — multe pliriĉigis lian vivon. En la esperantista medio — kvankam li nur spirite povis ĉecsti — li trovis tiujn komunsenton kaj vivosenton, kiujn li aliloke vane serĉis. Lia okupiĝo pri espe-

ranto estis pozitiva agado, por ke li fariĝu taŭga kaj valora ano de la tutmonda amika rondo kaj por ke li laŭ sia forto kontribuu al konstruo de nova mondo.

En 1934 mi ricevis de li du manuskriptojn por tralego kaj eventuala lingva korektado. Estis du longaj rakontoj. La unua, Aŭli, en la sama jaro aperis libroforme ĉe Literatura Mondo. La duan oni bedaŭrinde ne eldonis, sed ĝi aperis en la revuo. La titolon mi ne memoras, kaj mi ne posedas plu tiujn numerojn kaj do ankaŭ ne la novelon. Ambaŭ rakontoj estas reskriboj de rakontoj antaŭe aperintaj en la estona.

Aŭli temas pri knabeto en la estona kamparo, el tre simpla, oni eble povas diri primitiva medio. La ĉirkaŭmondon kaj la okazaĵojn la verkisto konsekvence kaj trafte redonas tute laŭ la perceptoj kaj konceptoj de Aŭli mem. La vivo prezentas al la infano amason da strangaj, konfuzaj, mirigaj kaj nekomprenoblaj aferoj, ofte timigaj. Entute ĉio estas granda enigmo, kun iom da ĝojo kaj multe da timo kaj malĝojo.

Adamson en tiu rakonto pentras la vekigantan homan konscion. Ĉio estas realisma, eĉ kampare realisma. Legante oni baldaŭ rimarkas, ke preskaŭ ĉio tute de si mem fariĝas bildoj de la homoj kaj la homa vivo entute. Estas plej alta formo de rakontado: la unuopaj realaj okazaĵoj kaj la simboloj de la homvivo kiel tuto estas unu kaj sama afero. La aŭtoro nenion aranĝis, nenion pli malpli lerte elpensis. Ĉio venas kvazaŭ de si mem.

La dua novelo temas pri maljunulo kun nebulliganta konscio, proksima al foriro el la vivo. Ĝi estas same bone farita. Verdire la du rakontoj, kvankam sen iu ajn rekta interligo, formas unu homogenan pecon, bildon de la homa vivo en formo de rakontoj pri ĝia vekigo kaj estingiĝo. Tial estas bedaŭrinde, ke ili ne estis eldonataj en unu volumo.

Persone mi rigardas tiujn rakontojn kiel verkojn de tre alta valoro. Ne senkaŭze mi menciis la nomon de Kivi — kvankam preskaŭ nekonata ekster la nordaj landaj tamen

samnivelulo kun la kreintoj de Don Kihote kaj Gösta Berling. La rakontoj de Adamson ne atingas la nivelon de Sep Fratoj, sed malproksima ĝi ne estas.

Kia estas la lingvo de tiu verkisto, kiu en sia tuta vivo eble nur du-, trifoje havis eblecon interparoli en esperanto? Certe ĝi havas mankojn el pure lingva kaj stila vidpunktoj. La vortoj kaj frazoj ofte estas pezaj, malgraciaj, ne ĉiam plej konvenaj por klare kaj simple esprimi la aferon. Aliflanke troviĝas multe pli da vortoj kaj frazoj, kiuj estas tre trafaj kaj impresaj. Plue, tiu peza kaj negracia stilo plene respondas al la medio, pri kiu ĝi parolas kaj verŝajne redonas ĝin pli bone ol farus tre glata kaj belfrizita stilo. Se mi havus rajton revizii la tekston, mi verŝajne tre malmulte ŝanĝus.

En 1934 aperis de li ankaŭ dekunu poemoj en la poemlibro Dekdu poetoj, eldonita de LM. La karakterizo, kiun Kalocsay en la antaŭparolo donas pri la poeto Adamson estas bonega, kaj pli grandan laŭdon ol li tie ricevas, mi ne povus doni tie ĉi.

Pri la lingvo de la poemoj Kalocsay diras interalie: "En liaj naturbildoj magie susuras, trilas, zumas la plej sonoraj sonimitoj, la tuta riĉa eblo de la lingvo. Vere oni povas diri, ke ĉi tie la lingvo jam estas ne nur instrumento, sed ankaŭ temo mem. Li preskaŭ ebriiĝas de la esprimpovo de l' lingvo kaj plezuras pri ĝi diboĉe."

Malgraŭ sia tiam mallonga esperantisteco li mirige bone konis kaj posedis la tutan vortrezoron de la lingvo kaj tre bone perceptis ĝiajn esprimpovojn. Kiel poeto li havis tre fortan senton por sonoj, rimoj kaj ritmo kaj ŝajne estis kvazaŭ kaptita de ili. En la komenco de la milito li sendis al mi kopiojn de diversaj poemoj, el kiuj mi en tiu ĉi numero aperigas kelkajn. En tiuj same kiel en Dekdu poetoj vi retrovas tiujn nomitajn kvalitojn. Laŭ mia gusto estas preskaŭ tro da rimoj. La rimoj kaj la verskonstruo tro altiras la atenton. Pli asketa poeziamanto eble skuus la ŝultrojn kaj deklarus, ke tiu poeto estas nura jonglisto. Tia prijuĝo tamen estus falsa. En ĉiu poemo de li, kiun mi

vidis, troviĝas kerno kaj senco inda de poezia formado, kaj li ankaŭ formas la temon. Poemon, kiu unuavide eble ŝajnas nur afekta rimajo, vi trovas enhava, eble eĉ profunda kaj kortuŝa, kiam vi pli atente legas. Mi estas konvinkita, ke almenaŭ tiu manpleno da presitaj poemoj de li restos viva en la esperanta literaturo.

Ŝajnas al mi dezirinde kiel eble plej baldaŭ eldoni libroforme la du menciitajn rakontojn kaj eventualajn aliajn prozaĵojn, same liajn poemojn. La aperintaj kune kun la presindaj neaperintaj certe donus almenaŭ volumeton. La esperanta popolo malmulte konis Adamson antaŭe, kaj la milito rompis ĉiujn pontojn. Tial ni almenaŭ nun montru, ke lia arda laboro en malsano, mizero kaj izoleco ne estis vana.

La german-rusa milito rompis nian kontakton. Jam antaŭe li estis tre malsana, kaj mi timis, ke mi neniam plu havos leteron de li. Venis tamen du 25-vortaj leteroj, peritaj de Ruĝa kruco. Ili diris, ke li kaj lia patrino vivas, sed nenion pli. Poste pasis longa tempo, kaj la milito finiĝis. Iom post iom ni retrovis kontakton kun amikoj en diversaj landoj, sed Estonio restis fermita al poŝta trafiko kun eksterlando. Sed jen malfruaŭtune 1945 venis de li karto en la sveda lingvo. Li skribis, ke li de februaro 1945 ne povas forlasi la liton. "Estas tede tiel longe kuŝi mortmalsana, sed kion fari?"

Li ricevis respondon de mi, kaj en la fino de januaro 1946 li skribis sian lastan karton. Interalie: "Mi kaj mia patrino estas ambaŭ malsanaj kiel antaŭe, sed mi povas legi ankaŭ en la lito." Tiu karto venis meze de februaro. Mian respondon li verŝajne ne ĝisvivis, ĉar li mortis la 7an de marto 1946.

*

En la aperintaj poemoj vi trovas la plej karakterizajn trajtojn de lia spirito. Estis multe da pesimismo en li, kaj ne senkaŭze. Ŝajne li neniam provis plibeligi la ekziston per oratorajoj. Tiun pesimisman kaj rezignon vi trovas en

la poemoj tie ĉi donataj same kiel en Dekdu poetoj. La doloro rilatas ne nur al li mem:

Sed mi ne bezonas gloron,
nek flatojn de vanta kortego,
en koro mi sentas doloron
de kruda hommortigo.

Kaj mi ne bezonas oron,
nek ĉiujn trezorojn de l' mondo,
sed sangan mi ploras ploron
pri homaj maljust' kaj senhonto.

Vi trovas en ili homaranisman sen oratorajoj, vi trovas lian propran suferon, lian ĝojon pro la naturo. La poemoj mem parolu al vi.

Sed mi volas fine mencii poemon, "Ni ĝoju", kiu troviĝas en Dekdu poetoj. Kiam mi unufoje legis ĝin, ĝi ne multe impresis al mi, sed iom post iom ĝia signifo pli kaj pli profundigis. Ĝi redonas animstaton, kiu mi trovis eĉ estonoj jam antaŭe sed precipe dum la milito eĉ rifuĝintoj, kiuj perdis parencojn, hejmon, hejmlandon, ĉion krom la propra vivo. Malgraŭ ĉiuj batoj ili restis ŝajne trankvilaj, adaptis sin al nova vivo, ridetis, eĉ kun milda ironio, klopodis per propra forto akiri novan lokon en la vivo kaj ankaŭ sukcesis. Unue tiu trajto ŝajnas fatalismo, sed poste oni rimarkas, ke estas pli granda eco. Estas vivosaĝo kaj animtrankvilo, eble lernitaj dum jarcentoj da sklavco kaj mizero.

Ni ĝoju sen ĝojo,
ni kantu sen gajo
kaj iru danepaŝe sur nia viv-vojo,
ĉar kantoj kaj dancoj
forigas laciĝon,
pliiĝas kuraĝon,
ni ĝoju!

Ni ĝoju sen ĝojo,
ni kantu sen gajo,
ĉu vintro, aŭtuno — por ni estu majo
kun floroj, birdĥoroj,
kun nura trilado
kaj suna brilado,
ni ĝoju!

Ni ĝoju sen ĝojo,
ni kantu sen gajo,
kaj se eksilentos por ĉiam ni foje,
ne estu ja plendo tuj antaŭ silento,
sed kantu birdĥoro
en lasta stertoro,
ni ĝoju!

Tio ne estas facila rimaĵo laŭ iama amerika devizo "keep smiling". Tio estas vortoj de homo, kiu venkis kaj superas sian sorton, kiu en si havas forton, kiu permesas al li ĝoji kaj kanti, kvankam mankas ĉiuj percepteblaj kaŭzoj de ĝojo kaj gajo.



Adamson antaŭ sia hejmo.

Poemoj de Hendrik Adamson

Nia plimulto

Faskoj da taskoj, polvo da solvo,
multaj projektoj, konjektoj.
Tiel ni paŝas, vizaĝojn ni kaŝas
en dika volvo de maskoj,
fie konspiras, sed pie jen miras,
ke LA MOVADO senmovas;
sensalas la salo, sed kia kialo,
neniel diveni ni povas.
Okulo kun trabo rigardas kun strabo
al ligneret' de l' najbaro.
Ho, ni vulpegoj kun multaj kulpegoj!
Abundas parol', mankas faro.

Aktuale

Ho jen pensfulmoj furioze frapas
al rok' de l' apati'.
Alpaŝis kaj alĝapas
la fil' de la patri'
la filon de la tuta tero
kun lia ideal':
de ĉiuj rasoj plenprospero
kiel real'.

Ho ve, temp' longa en la revoj pasis,
fervoris la malam',
la pacadeptojn ĉasis.
Hurakriaĉe jam
militboladas la mondpartoj,
kur' de amok',^{*}
plu ne troviĝas sur mondkartoj
trankvila lok'.

Idilie

Kat' murmuretas, ŝpinrado bructas,
zumkantas maljuna avin'
en la krepusko, griza kiel musko,

* Frenca mortigemo.

kun la katid' en la sin'.
Katid', katidino! — alkuras jen Linjo,
nepino ruĝvanga, ideto pursanga
de la Kaleva gent'.*
Kaj kantas avinjo, aŭskultas ŝin Linjo,
murmuras la kato, bructas ŝpinrado
en la krepusko, griza kiel musko,
ekstere muĝas la vent'.

Printempo

Alaŭd' anoncis pri printemp'
gajkanto en acra alt',
kaj komenciĝis ĝi kun salt',
fest' de flirtad'
kaj tintotemp'
de best', birdar'.
Revenis sturno el ekzil',
al sia griza ligna kest',
al la pasintomera nest',
riparas ĝin kun gaja tril',
kun buba fajf', kokinklukad',
meditas jam pri edukad'
de novidar'.
Ekondas mar'
de revoj kaj de hel',
de hela bel'
kaj ludo de lumradiar'.
Vekiĝas ĉie la diar'
de plantoj, bestoj, ter', aer',
kaj kantoj, festoj. Primaver', **
sorĉist' potenca, vokas vin,
ja ankaŭ vin.

Fajroj

(Somervezo)

Fajroj fumas, fajroj lumas
en la valoj. Nubvaloj
ruĝaj fuĝas, vento muĝas
tra l' ĉielo. Kiel mielo
bonodoras trifolio,
orkoloras la trolio.***

* La estonoj. Aludo al estona mitologio.

** Printempo. Poezia vorto.

*** Floro: *Trollius europaeus*.

Fajroj fumas, fajroj lumas
sur la montoj, sur la pontoj
oni kantas, oni dancas
sur verdejoj de l' herbejoj
kun la miloj de kantgrioloj,
kun la liroj, kun lampiroj.

Fajroj fumas, fajroj lumas,
nigras peĉe, flagras meĉe;
longponardoj, flampetardoj
kun klakado kaj krakado
sin elmetas, sin eljetas
el ĥaos' al ĉielkloŝo.

Fajroj fumas, fajroj lumas
en la valoj. Nubvaloj
ruĝaj fuĝas, hirtaj flirtas
tra l' ĉielo. Kiel mielo
bonodoras trifolio,
orkoloras la trolio.

Memoru pri la mortol

Kor' mia, malfermita vundo,
senĉese gutas, ŝprucas sang',
verŝiĝas flue al tergrundo,
malplivigliĝas man' kaj lang'.

Mallaŭte sonas jam lido*,
kvazaŭ premata de sordin,**
kaj falpuŝiĝas verspiedo
de la kanzon, sonet', terc'in'.

Per epigramoj plu mi vergas
nenion — malakriĝas plum';
per larmoj, sango mi aspergas
la grundon — baldaŭ polv' kaj fum'.

* Poezia vorto. Kanto.

** Sonmalfortigilo por muzikinstrumento.

La Palestina problemo el vidpunkto de justeco

De J. KOHEN-CEDEK, Jerusalem

(La konceptoj kaj opinioj pri la palestina problemo estas diversaj. Jen palestina hebreo prezentas siajn vidpunktojn. La juda problemo kiel tuto estas malfacila kaj ne solvebla sen ŝanĝo de pensomanieroj de la homoj en diversaj landoj. Malfacila estas ankaŭ tiu parto de la tuto, la palestina demando. La tuta mondo estas pli malpli responde en tiu afero. La judoj prezentis planon por savi siajn malfeliĉajn kaj persekutatajn fratojn en Eŭropo. Kontraŭbatali tiun planon sen prezenti alian almenaŭ same bonan, sen klopodo al helpo por la judoj, signifas mizeron kaj eble morton al dek miloj da judoj, signifas aprobon de subpremo kaj mortigo, signifas krimon kontraŭ homeco.)

S. E.

I. *La stato.* Palestinon regas brita administracio, laŭ mandato de Ligo de Nacioj. La mandato kondiĉigis al Britujo helpi rekonstrui en Palestino la "hebrean nacian hejmon", per subteno de enmigro kaj koloniado.

Fakte la angla administrado ĉiam ignoris tiujn devojn: la enmigron ĝi limigis de 1921 kaj en 1939 preskaŭ ĉesigis ĝin. La aĉeton de grundoj ĝi malebligis, enkondukinte rasprincipan leĝon, laŭ kiu hebreoj ne rajtas posedakiri grundon en certaj landpartoj.

La spaco de la palestina mandatlando ampleksis unue 128.882 km². La regnestraro forigis el ĝi la orientan parton, nomatan Transjordanio (90.000 km²), fondis tie en 1921 araban aŭtonomian regadon kaj en majo 1946 proklamis ĝin sendependa reĝlando. Same la regnestraro apartigis administre la sudan dezertregionon de Beer-ŝeba'a (12.577 km²) kaj malgrandigis la spacon de Palestino ĝis 26.305 km² (= 5 % de Svedujo, 75 % de Nederlando).

La popola divido de la nuna palestina loĝantaro estas (rondcifere) jena:

Hebreoj	700.000
Araboj (islamanoj) ...	1.000.000
Kristanoj	130.000
Aliuloj (ekz. druzoj)	20.000
	<hr/>
	Sume 1.850.000

Tri politikaj faktoroj agas en la lando:

1. La hebrea nacia movado, la t. n. cionismo, kies celo estas per amasa enmigro kaj per koloniado atingi la plejmulton en la lando kaj krei hebrean ŝtaton.

2. La araba nacia movado, postulanta nun proklami Palestinon kiel sendependan araban ŝtaton.

3. La angla administracio, kiu ĉiam provis elvoki en Palestino kontraŭecojn inter hebreoj kaj araboj kaj dank' al tio resti en rolo de "tertius gaudens"*. Lastatempe ĝi iom ŝanĝis sian orientiĝon: kreinte la t. n. "Araban ligon" (konsistantan nun el Egiptujo, Sirio, Irako, Arabujo, Jemeno kaj Transjordanio), ĝi verŝajne dezirus vidi Palestinon kiel arabŝtatan anon de tiu estonta federacio por pli tiamaniere gvidi la tutan kunligotan panaraban** mondon. Nur tiel estas klarigebla ĝia obstina malpermeso de hebrea enmigro kaj malhelpo al koloniado de la lando.

II. *La problemo.* Multaj pensas: Ĉu juda "invado" en Palestinon estas justa procedo, pravigebla el morala vidpunkto? Kvankan tiu paca koloniado ne similas militkonkeron, ĝi tamen en certa grado estas akiro de fremda posedaĵo. La arabaj indiĝenoj, loĝantaj tie dum multaj jarcentoj, kutimiĝis rigardi Palestinon kiel sian patrujon. Kaj jen venas judoj, konstruas vilaĝojn kaj urbojn kun evidenta aspiro atingi nombran plimulton kaj tiel akiri ĉiujn

* Latino — la tria, kiu ĝuas, profitas.

** Pan- = tut'.

ekonomiajn, kulturajn kaj politikajn avantaĝojn, kiujn tiu ŝtato povas alporti. Ĉu estas justa tiu paca landkonkero?

Eĉ se la koloniado alportis al la araboj eŭropan civilizon, eĉ se la judoj sekigis la marĉojn, sanigis la landon, transformis la dezertajn kampojn en fruktodonajn ĝardenojn, alportis ekonomian prosperon al la araboj, eltrovis novajn laboreblojn, plibonigis la laborajn rimedojn kaj kondiĉojn kaj plialtigis ekonomie kaj kulture la vivnivelon — la arabo tamen povas proverbe diri: "Nek pikilon abelan, nek ĝian mielon!" Ĉar neniu popolo konsentus vendi sian nacian idealon pro ekonomiaj avantaĝoj.

III *Judaj cirkonstancoj.* Por prijuĝi judajn kaj arabajn pretendojn koncerne al Palestino estas necese kompari iliajn politikajn statojn kaj cirkonstancojn.

La hebreoj estas sendube unu el la plej krekapablaj popoloj en la mondo. Ĉu oni menciuj ilian kontribuon al la eŭropa kulturo? Tiu estas eĉ neimagebla sen la judaj kontribuoj! Imagu Eŭropon sen Biblio, sen kristanismo, sen kontribuoj de judaj filozofoj (de Spinoza ĝis Henri Bergson), sen juda medicino (de Majmonides ĝis Steinach), sen Freud kaj Einstein, sen judaj muzikistoj (de Mendelssohn-Bartholdy, Saint-Saëns, Bizet, Ravel), sen iliaj literaturistoj (H. Heine, J. Wasserman, Zweig-oj, G. Brandes, G. d'Annunzio, I. Ehrenburg, Vicki Baum), sen iliaj meritoj en artoj (J. Izrael, M. Liebermann, M. Antokolski, Mark ŝagal, E. Rachel, E. Dusc, M. Reinhardt), sen socialismo (Marx, Lasalle, Bernstein), sen komunismo (Trotskij, Sverdlov, Sinovjev, Kamenev, Sokolnikov), sen bankoj, kredito, komerco, sen B. Disraeli, sen Rotschild-oj, sen Rathenaŭ-oj, sen judaj industriaj inventoj, sen kinematografio, sen penicilino, sen atombombo kaj sen... esperanto!

Tiu krekapabla popolo jam dum jarmiloj estis devigata vivi ĉie en stato de fremduloj: vivi en fremda kulturatmosfero, spiri fremdmedian aeron, paroli fremdajn lingvojn, reguligi siajn rilatojn laŭ fremdaj leĝoj, akcepti fremdajn

kutimojn kaj ne povi libere disvolvi siajn proprajn naturajn kapablojn, ne evoluigi siajn proprajn animajn ecojn. Ĉu tio ne estas kontinua tragedio?

Tiu tragedio povus esti fizike eltenebla. La veran suferon tamen kaŭzas la senindulga malamo, malŝato kaj envio, kiuj ĉirkaŭis la judojn ĉiam kaj preskaŭ ĉie. Tiu malamo ofte esprimiĝis per bojkoto kaj neakcepto en lokaj societoj. De tempo al tempo ĝi prenis formon de laŭleĝaj senrajtigoj, de persekutoj, amasaj elpeloj el la loĝlokoj kaj fine de ĝeneralaj buĉekstermoj, kun neesprimeblaj torturoj. Tiaj okazis dum la krucmilitistaj iroj tra multaj eŭropaj landoj, dum ĝeneralaj elpeloj de judoj el Hispanujo kaj Portugalujo (1492: 1496) kaj fine nun antaŭ niaj okuloj, kiam la hitlerismo ekstermis dum nepriskribebla torturo ses milionojn da judoj, kies sola kulpo estis, ke ili apartenis al sia popolo.

Dum jarmiloj la judoj serĉis solvon de sia sorto. En la fino de la 19a jarcento venkis en la eŭropa politika koncepto la nacia ideo, laŭ kiu eĉ la plej etaj kaj kulture ankoraŭ negravaj popoloj ricevis proprastatan sendependecon. Tiam naskiĝis ankaŭ la juda nacia idealo. La cionismo proklamis, ke la judoj same kiel aliaj popoloj rajtas posedi propran hejmlandon, kie ili aranĝu sian vivon laŭ propraj gusto, manieroj, leĝoj, tradicioj, kie ili kreu sian propran kulturon en sia propra, biblia lingvo, evoluigi proprajn sociajn instituciojn laŭ sia nacia idealo. Tie la ŝtato mem defendu ilin de persekutoj, tie ili ne sentu malamon de fremduloj, tie ili mem regu sian historian sorton kaj reakiru la honoron de memreganta nacio.

IV. *Kelkaj klarigindaj evidentajoj.* Propran ŝtatviven ĝuas nun ne nur popoloj gigantaj sed ankaŭ etaj; eĉ kartveloj en Kaŭkazio, albanoj kaj eĉ baŝkiroj en Uralo. Kion ili kontribuis al la tutmonda kulturo? Sed neniu dubas pri iliaj rajtoj pri propra patrujo, pri certagrada sendependeco kaj memstareco. Kial nur la 12-miliona (antaŭ la milito 19-miliona) hebrea popolo restu en ekzilo? Kaj — en

geĥna ekzilo! En la nerusa parto de Eŭropo restas nun 1 1/2 miliono da senhejmaj hebreoj. Kien ili iru? Fermi al ili la pordon de Palestino signifas kondamni ilin al sufero kaj degenerado.

Kial ĝuste Palestino kaj ne alia lando? Ĉar Palestino estis ilia patrujo, ĉar Palestino estas la lando, al kiu ili sopiris dum du jarmiloj, pri kiu ili proĝis tri fojojn ĉiutage, pri kiu ili ĉiam revis, pri kiu versis iliaj poetoj kaj kantistoj la popolkantoj. Ĉu iu ajn nacio cedus propravole sian patrujon? Eĉ grenlanda eskimo ne konsentus cedi sian naskiĝejon, eĉ kontraŭ la Riviero!


Kaj se alia lando, kiu? Ĉu ekzistas sur la tero nenlogata angulo? Eĉ se la mondo proponus al la judoj iun terpecon kun maldensa, primitiva loĝantaro, ni ne forgesu, ke koloniado estas longedaŭra afero; post kelkaj jardekoj de enloĝiĝo kaj evoluo la nova jam progresinta generacio de indiĝenoj protestus kontraŭ la invado — same kiel tio okazis en Palestino.

Generale la historio ne konas koloniadon kun konsento de la indiĝenoj. Se la bravaj elmigrantoj sur "Mayflower" estus demandintaj al la indianoj permeson kolonii la landon, ekzistus hodiaŭ nek amerika demokratio nek ĝia civilizo, kaj anstataŭ Novjorko kuŝus tie sovaĝaj herbejoj.

Tial estus ridinde atendi araban konsenton pri juda enmigro en Palestinon. La beduinoj (ilia nombro tie estas 70.000) neniam konsentos. Ekloĝo sur la dezertaj kampoj kaj sekigo de marĉoj malvastigas ilian terenon de paŝtado kaj vagado. La malklera kaj konservativa felaĥo (vilaĝano) estas siavice obstina portanto de ĉiaj malklaraj kontraŭprogresaj ideoj. La ĉfendio (la feŭda grandbiena posedanto), tenanta la felaĥojn (pro iliaj monŝuldoj al li) en kondiĉoj de mizero kaj ekspluato, timas la progreson, kiu minacas lin per perdo de lia influo kaj socia aŭtoritato. Ĉu de tiuj faktoroj devas dependi la hejmenreveno de la juda nacio?

V. *La araba situacio.* La t. n. Araba Ligo konsistas el Egiptujo, Sirio, Irako, Arabujo, Jemeno kaj Transjordanio. Ĝia politika celo estas "kuna defendo de la komunaj interesoj". Sed fakte unuigas ilin nur unu faktoro: la deziro de la Brita imperio. Efektivajn komunajn politikajn, ekonomiajn aŭ kulturajn interesojn ili ankoraŭ ne disvolvis. Ankoraŭ ne — ĉar iom post iom kun ĝenerala plua evoluo de la enpenetranta eŭropa civilizo, certe aperos pli intimaj interrilatoj kaj komunaj interesoj.

Ĉar la mondo nepre paŝas antaŭen al certa liberiĝo de ĉiuj nun dependaj popoloj (pri tio dubas ja neniu!), venos iam la tempo, kiam unuiĝos ĉiuj arabaj popoloj de la Atlantanto ĝis la Persa golfo. Tio estas la idealo de la t. n. panarabismo. La aspekton de tiu supozeble federacia araba imperio prezentas la suba skizo. Juda Palestino estus malhelpanta kojno al tiu vasta unuiĝo. Jen la sola afero, kiu nun kuntenas la araban ligan, estas senceda kontraŭstaro al juda enmigro en Palestinon.



La spaco de tiu estonta araba ŝtato estas verdire giganta. Tion montras la suba tabelo (la landnumeroj respondas al tiuj sur la karto).

lando	Amplekso en km ²	Loĝantaro en milionoj
1. Maroko hispana	30.000	0,5
2. Maroko Franca	420.000	5,5
3. Alĝerio	575.000	5,0
4. Tuniso	125.000	2,0
5. Libio (kun Tripolis)	1.500.000	0,8
6. Egiptujo	1.000.000	16,0
7. Sudano (angla-egipta posedo)	2.500.000	3,5
8. Transjordanio	90.000	0,3
9. Sirio (kun Libano)	150.000	2,6
10. Irako	435.000	3,6
11. Arabujo (Heĝas, Neĝed, ŝamar, Asir)	1.500.000	2,5
12. Jemen (kun Aden)	220.000	1,0
13. Hadramuth	150.000	0,1
14. Oman	220.000	0,5
15. Kuvcejth	10.000	—
Sume	8.925.000	43,9

Por komparo:

Palestino	25.000	1,8
-----------	--------	-----

Por plua komparo: la spaco de Eŭropo estas 9.700.000 km² (ĉiuj ciferoj estas rondigitaj). La estonta Panarabujo egalas preskaŭ al la tuta eŭropa spaco, kaj ĝi superas Palestinon tricent kvindek naŭ fojojn ($8.925.000 : 25.000 = 359$).

Sole el tiu fakto devas sekvi nia konkludo pri la palestina problemo rilate al justeco! Nacio 44-miliona, okupanta spacon, sur kiu povas loĝi 500-miliona loĝantaro (tiu de Eŭropo), povas (kaj devas) sen sentebla malutilo por si fordoni 1/359 de sia tereno al senhejma najbaro! Se ili ne faras propravole, la mondo devas devigi ilin. Same kiel ĉiuj kulturaj nacioj devigis (dum certa historia perio-

do) la riĉajn grandbienajn posedantojn fordoni parton de sia tero al senkampaj kulturistoj. Same kiel nuntempe oni en eŭropaj landoj suferintaj de bombadoj faris leĝojn, laŭ kiuj multĉambraj loĝejposedantoj devas cedi parton de siaj loĝejoj al homoj, kiuj pro detruo senhejmiĝis.

VI. *Sorto de palestinaj araboj.* Sed unu miliono da palestinaj araboj perdus sian politikan avantaĝon de landregado! — Jes, ili perdus. Anstataŭ gajni ankoraŭ unu regionon, ili ricevus nur aŭtonomion en kadro de juda ŝtato, aŭtonomion publike garantiitan kaj protektitan de deko da najbaraj potencoj. Ili restus nacia malplimulto same kiel la francoj en Kanado, la buroj en Sudafriko, la hungaroj en Rumana Transsilvanio ktp. Ĉiuj grandaj kaj eĉ potencaj popoloj posedas popolparton en fremdujo. Tio ne estas tragedio, precipe kiam la ŝtatpopolo zorgas pri la aparta popolbranĉo, nutras ĝin kulture kaj defendas ĝin per sia aŭtoritato. La tragedio komenciĝas nur tiam, kiam la tuta nacio troviĝas en ekzilo.

La palestinaj araboj parolus antaŭ la juĝistoj sian propran lingvon, evoluigus siajn proprajn sociajn instituciojn, gvidus siajn proprajn lernejojn, kaj iliaj parlamentaj gvidantoj gardus la precizan funkciadon kaj ĝustan plenumon de tiuj punktoj en la palestina demokratia konstitucio, kiuj rilatus al ili.

Ekonomie kaj kulture ili ĝuus la avantaĝon de najbareco kun pli civilizita kunloĝanto, labordonan kaj profitportantan. Jam nun la ekonomia stato de palestinaj araboj elvokas envion de iliaj najbarlandaj samnacionoj. La dota edzinprezo en Palestino superas dckoble tiun de Cipro! Najbarlandaj araboj volonte enmigras Palestinon, ĉu por konstanta restado ĉu por sezonaj laboroj. Vendante parton de sia superflua tero la arabo akiras rimedojn por liberiĝi de la cendia ekspluato kaj intensigi sian terkulturadon. Eĉ dum la plej mallumaj senlaboraj krizperiodoj en la antaŭmilita Eŭropo regis en Palestino ekonomia prospero, kaŭzita de juda enmigro kaj rimedalfluo.

VII. *Konkludaj avertoj.* Palestino transformiĝos en judan ŝtaton, ĉu dank' al brita helpo ĉu spite al brita kontraŭstaro. Ĝis kiam finiĝos mizero, daŭros batalo kontraŭ ĝi. Ĝis kiam finiĝos problemo pri judoj, daŭros ilia senceda batalo kontraŭ la kondamno al suferado kaj degenero.

Estus por la tuta mondo kaj speciale por la Brita imperio pli bone kaj pli profite, se la altidealisma, saniga, kulturportanta kaj konstrua hebrea agado en Palestino efikus seninterrompe, kviete disvolviĝante en siaj leĝaj, pacemaj kadroj.

Sed se eksteraj fortoj, kaj speciale tiu de la mandatregno, provos daŭre enŝovi malhelpilojn en la radojn de la antaŭeniranta progreso, tiu tamen ne haltos! Nur kripliĝos ĝia vojo kaj la vojrimedoj. Anstataŭ resti pacema, ĝi fariĝos batalema. Ni revenos al la stato, kiam "duono de la junuloj faradis la laboron, kaj duono tenis lancojn... per unu mano ĉiu faris laboron kaj per la alia tenis batalilon..." (Nefiemja IV).

Tiun staton Palestino fakte jam atingis. Almenaŭ 100.000 judaj gejunuloj nun laboras tenante armilon kaj lernante militarton. La korojn dolorigas memoro pri ses milionoj da mortbuĉitaj gefratoj, la dentoj estas kunpremitaj en firma decido pretigi savejon por la forrestantaj, la pugnoj premfermitaj en defendpretemo. La aero estas troŝargita, tro arda. Oftaj teroristaj agoj ŝajnas esti preludo de apenaŭ evitebla granda protesteksplodo. Ne ĵetu fajrero en pulvujon! Forigu la barojn: malfermu vaste la pordegojn de la lando!

Junio 1946.

Ŝtormo super Eŭropo

De G. J. DEGENKAMP

Hurle muĝas, sible krakas:
Brulas kerno de l' vulkano.
Homoj time ĉirkaŭvagas;
Furiozas la satano.
En lando germana fariĝas batal';
Malvenkas la homo; triumfas vandal'.

Fulme flagras, tondre bruas,
Erupcias la kratero;
Tertremad' la mondon skuas;
Malserenas la aero.
En centra Eŭropo eksplodas infer';
Triumfas mensogo, perfido, koler'.

"For libero, for la paco",
Tiranie diktas ŝtato.
En infer' ne estas spaco
Por hebre' kaj demokrato.
Amase la homoj forfuĝas tra lim',
Pelataj de l' murde krimula reĝim'.

Regas mano de l' tirano,
Hitler hekatombojn festas;
Brutas la nobelgermano;
Homoj pli ol bestoj bestas.
Leviĝas la sanga standard' de malam';
"Al kulto pratempa", fariĝas program'.

Plorkriado, plendoj, vcoj,
Ĝemoj, larmoj sufokiĝas.
En infer' de l' koncentrejoj
Senkulpuloj turmentiĝas.
Sadistaj kanajloj, la feĉ' de l' soci',
Torturas viktimojn en sanga orgi'.

Por protekti hipokrite,
La germana hord' invadas
Aŭstran landon senmilite,
Bohemion enparadas.
Kultur', civilizo kaj ĉia moral'
Jam cedas la lokon al mor' de vandal'.

Malserenas atmosfero
Super tuta kontinento;
Pli avida al konkero
Iĝas la barbara gento.
"Spacon por vivi" laŭtiĝas postul';
"Rompu la pacon sen ia skrupul'!"

Tondre bruas la kanonoj;
Brule ruĝas la aero;
En la polaj regionoj
Reĝas vco kaj mizero.
Teŭtonoj* sin kronas per venkaŭreol',
Oferas al sia milita idol'.

Vane sin la land' Norvega
Kontraŭ germanar' defendas,
Al Danio l' avidega
man' rabeme sin etendas.
Naciojn pacamajn kun alta kultur'
Gisfunde elrabas teŭtona vultur'

"For traktato, for deklaro
pri pacamo, lojaleco!"
Nun al landoj ĉe la maro
Venas fin' de neŭtraleco.
En regno de belgoj, en ŝtat' Nederland'
Rabie kondutas teŭton-arogant'.

La fieran Francan ŝtaton
Ne nur teŭtonar' insidas,
Sed la ŝtataŭtoritaton
Propra general' perfidas.
La abomeninda faŝisma venen'
Infektas eĉ faman marŝalon Pétain.

Pesta vento suden blovas,
En la Jugoslavan ŝtaton,
Kie ĝi malamon ŝovas
Inter serbon kaj kroaton.
"Dividu kaj regu!" konata sentenc',
Fariĝas de l' hunoj malnobla potenc'.

* Germanoj.

Furiozas uragano,
Regas morto kaj malbenoj;
En la landoj de Balkano
Brave luktas la helcenoj.
Bulgaroj sin dungas en tiu batal'
Al gento teŭtona malnobla vasal'.

Hitler jam sin mem ne konas;
Lin obsedas fantazio;
Moskvan li napoleonas,
Morton semas en Rusio.
Masakre viktimas pro fifrenezul'.
Milmiloj da homoj en sango kaj brul'.

Sed nunfoje li craras
En la mondkonkera plano:
Rusoj lin en vojo baras.
Dentogrincas la tirano.
Stalingrad, urbo, al vi la honor'!
Sur viaj ruinoj sin turnas teror'.

Sur la fundo de mizero
La popoloj plende veas;
Sed ekĝermas la espero,
Ke Eŭropo ne percas.
Orienthorizonte vidiĝas aŭror';
Proksimas la fin' de l' inkuba teror'.

El Anglio kaj Kanado,
El trans vasta Atlantiko
Venas helpo kaj savado,
Eĉ el Rusa respubliko.
Ploj grava batal' el la mondhistori'
Decidas pri fin' de l' teŭtontragedi'.

Sereniĝas la ĉielo;
Jam forpasis uragano;
Kaj triumfas pacanĝelo
Super la nobelgermano.
Pri mondkatastrofo atestas ruin'.
Jen homa fatalo, de l' mondo destin'!

Kiel popularigi librolegadon?

De EINAR HULT

Troviĝas malnova proverbo, ofte citata: "Diru al mi, kun kiu vi festas, tia vi estas!" Kiam temas pri librolegado, ni povas iom ŝanĝi la frazon kaj diri: "Diru al mi, kiujn librojn vi ŝatas legi, kaj mi povas diri al vi, kia homo vi estas!" Ĝenerale estas tiel, ke la gusto, kiun ni montras elektante iun libron por legi, tre klare konigas, al kiu kategorio de legantoj ni apartenas. La enhavo kaj la kvalito de la libroj, kiuj troviĝas sur la librobretaj de nia hejma biblioteko, honoras ne nur la verkintojn de la libroj sed en alta grado ankaŭ nin mem.

Ne estas troigo aserti, ke la hejma biblioteko perfidas pli multe al eventualaj gastoj, ol ni efektive emas kredi. Estas facile al atentema gastoj karakterizi vin per helpo de la libroj, kiujn vi posedas. Libroj perfidas ne nur la sekretojn de la herooj en la libroj, sed ili konigas ankaŭ viajn personajn idealojn kaj karaktertrajtojn. Havigante librojn al nia hejma biblioteko ni do elektu kaj elektu bone!

Per la cititaj ekzemploj mi antaŭ ĉio volas atentigi al vi pri la grava rolo, kiun la libroj ludas en nia vivo. Legado donas ne nur plezuron kaj distraĵon al ni, sed ĝi ege plibeligas kaj pliriĉigas la vivon. Libro estas kaj amiko kaj instruanto, se ni nur atente aŭskultas al la instruoj, kiujn ĝi donas. Per la libroj ni konatiĝas kun la problemoj kaj la vivosortoj de aliaj homoj, kaj tio povas faciligi niajn proprajn problemojn.

Kiel kaj kion ni legu? Ĉu ni "glutu" grandan nombron da libroj ne atentante pri la kvalito de ili? Kompreneble ne! Ni memoru, ke koncerne al librolegado la plej grava afero ne estas legi grandan nombron da libroj, sed pli gravas, kiel ni legas ilin. Bedaŭrinde multaj libroj ne estas legindaj, ĉar ilia enhavo tute ne "donas" ion al la legantoj. Troviĝas multaj verkistoj, kiuj konscie kaj false priskribas la vivon kaj la homojn, kiujn ni trovas en la libroj. La

motivo de tiu falsado oble estas vekti la scivolemon de la legantoj aŭ popularigi la librojn. Legante librojn ni do nepre ne forgesu uzi nian propran cerbon, kaj ni kritike me legu ĉion.

Kiajn librojn ni rekomendu al amikoj, kiuj ne scias kion elekti? Feliĉe la literaturo estas ampleksa, kaj ni do havas multe da ebloj por elekti. Certe eblas kontentigi ĉiun guston, eĉ la plej pretendeman. Ĝustaj kaj ne spertaj legantoj tamen bezonas konsilojn, almenaŭ en la komenco. Estas facile erarvagi en la literatura mondo. Tion montras klare la populareco de la pli malpli legindaj semajnogazetoj. Semajnon post semajno granda nombro da homoj "glutas" la ofte tre senvaloran enhavon de tiaj gazetoj. Ĉu tia legado estas rekomendinda? Ĉu la legado de tiaj noveloj, kiuj ĝenerale troviĝas en la semajnogazetoj, estas io alia ol surogato?

Se ni eventuale rekomendu iun libron, ni do elektu librojn de fidindaj verkistoj, kies celo estas ne nur fari profiton sed ankaŭ edifi kaj plibeligi la idealojn kaj pensojn de la legantoj. La motivo de nia legado ofte estas en agrabla maniero pasigi liberan tempon. Kial ne trafi du celojn per unu ŝtono? Tio estas ebla, se ni konscie elektas la librojn, kiujn ni legos. La libroj ne nur distru nin sed ankaŭ edifu. Fantazia libro ne tiom valoras, kiom la libroj verkita de verkistoj, kiuj realece priskribas la vivon kaj la homojn.

Kelkfoje ni ja emas per helpo de iu libro eniri la fantazian mondon, kie ĉio estas pli bona kaj bela ol nia "ordinara" mondo, sed la demando estas, ĉu la verkistoj, kiuj skribas pri "veraj" homoj, tamen ne faras al ni pli grandan servon. Ĉu tiaj verkistoj ĝenerale estas same popularaj, kiel la fantaziriĉaj verkistoj? Bedaŭrinde tiel ne estas. Kiel klarigi tion?

Troviĝas proverbo laŭ kiu la homoj ŝatas trompiĝi. Konstatante la popularecon de certa kategorio de verkistoj oni ne povas pridubi la ĝustecon de tiu proverbo. Ju pli fantaziaj kaj nekredablaj estas la noveloj, des pli kreskas la

nombro de legantoj. Kiom popularaj estas ekzemple la noveloj pri belaj ŝejkoj* kaj filmidoloj! Certe la plimulto de la virinaj legantoj kun admiro kaj eble kun envio legas pri la paradizo, kiun ŝejko au filmidolo povas doni al sia virino. Kiom da hejmaj "tragedioj" ne kaŭzas tiaj verkoj! Kion malriĉa edzino pensu pri la propra edzo, kiu ne kapablas doni al ŝi la saman paradizon! Oni facile forgesas, ke la herooj de la libroj nur malofte havas siajn egalulojn en la vera vivo.

Ĉu la legado pri la luksa kaj aventurriĉa vivo de la filmidoloj iel utilas al ni? Ĉu ĝi ne male malkontentigas nin, se ni eventuale ne havas la samajn eblecojn vivi interese? Ankaŭ el morala vidpunkto multaj libroj estas kritikindaj, aŭ ĉu la moralo de la homoj vere estas tiom malbona, kiom kelkaj verkistoj ŝatas pentri ĝin? Kial la verkistoj detale priskribas intimajn amoscenojn? Ĉu ne por vekti la scivolemon de la legantoj kaj tiamaniere pligrandigi sian propran profiton? Ĉu tiaj libroj iel edifas la legantojn? Tute ne! Male ili kunagas por pli malbonigi la moralon. Mi opinias, ke ju pli oni skribas pri la malboniĝo de la homa moralo, des pli malbona ĝi fariĝas. Mensogo sufiĉe ofte aŭdata fine estas kredata. Komprenoble troviĝas multaj malmoralaj homoj, sed pro tio ni ne kredigu, ke la plimulto el la homaro malalte taksas fidelecon kaj virgecon.

Ĉu ni rajtas kritiki verkistojn, kiuj en siaj libroj uzas krudajn vortojn kaj blasfemojn? Troviĝas legantoj, kiuj ne emas legi librojn de certa tipo ĝuste pro tio, ke la verkisto tiel "krude" esprimas sin. Ekzemple en Svedujo la verkisto Jan Fridegård ofte renkontis kritikon, ĉar li uzas tiom da krudaj vortoj kaj blasfemoj. Sed ĉu ni kritiku lin pro tio, ke li donas al ni realecan kaj fidindan bildon pri la homtipoj, kiujn li celas pentri? La personoj, kiuj ludas la ĉefrolon en liaj libroj ĝenerale estas malriĉaj kamparanoj, homoj, kiuj ne estas kleraj, simplaj homoj, kiuj ne kapablas esprimi ĉion per belaj vortoj kaj frazoj. Se Fridegård vortigas tion, kion tia homo diras

* Ĉefo de araba gento, vilaĝo ktp.

dum la ĉiutaga vivo, li ja nepre uzu blasfemojn. Se temas pri konstrulaboristo, kiu batas sian polekson en la laboro, la verkisto komprenoble rajtas citi la vortojn, kiujn la laboristo diras en sia "malfeliĉo", ĉu ne? Ni do ne tuj kritiku, sed unue esploru la motivojn de la malbelaj vortoj. Pro la uzo de tiaj vortoj ni ne kondamnu iun verkiston. Prefere ni kritiku la verkistojn, kiuj per tro belaj vortoj priskribas la vivon kaj la homojn.

Por ni esperantistoj la elektado de legindaj libroj ne estas tiel malfacila kiel al la legantoj de naciaj libroj. La esperanta literaturo nuntempe estas tre ampleksa, kaj ĝenerale oni eldonis nur la plej legindajn verkojn. En niaj vicoj ni posedas grandan nombron da lertaj tradukistoj kaj eĉ verkistojn, kiuj verkas originale. Ni do ne havas kialon plendi. Per la legado de la esperanta literaturo ni ankaŭ trafas du celojn per unu ŝtono: unue ni ekzercas la lingvon, due ni havas okazon konatiĝi kun pli lertaj verkistoj. Niaj "propraj" verkistoj ne verkas pro la motivo fari personan profiton, sed por helpi al la idealista esperanta movado disvastiĝi kaj riĉiĝi.

Nur etan rimarkigon mi havas koncerne la esperanto-librojn. La libroj ofte estas presitaj sur tro malbona kaj malbela papero, kio tre malgrandigas la ĝuon legi ilin. Komprenoble la enhavo pli gravas ol la aspekto, sed ankaŭ la vesto de la libroj ludas certan rolon por logi la legantojn.

La enigmo de la tempo

De CHR. HEILSKOV

Kontraŭe al la populara koncepto, ke la tempo estas io reala kaj la eterneco io fikcia aŭ dubinda, oni per pli profunda pensado efektive estas devigata konfesi, ke la vero pri tiu problemo estas tuta mala. Mil faktoj pravas, ke tempo estas iluzio.

La suba rakonto temas pri okazintaĵo, kiu povas kaŭzi multe da meditado pri la enigmo de la tempo. La klarigon de la travivaĵo mi lasas al la legantoj.

Iun tagon en la somero 1908 mi havis strangan sonĝosperton. Estis en Aarhus, kie mi tiam loĝis. La antaŭan vesperon mi revenis el la urbo Hjörning, kie mi ĉeestis entombigon de parenco, kaj laca pro la vojaĝo mi tuj enlitiĝis.

Mi "sonĝis". Jes, la komencon de tiu sperto oni eble povas nomi sonĝo, sed la fino estis io tute alia. Miaj unuaj perceptoj estis, ke mi troviĝas en roklando proksime ĉe la maro, kiu etendiĝis sin suden de nudaj marbordaj rokoj. Mi memoras, ke mi malsupreniris al la bordo, de kie mi neembarasite daŭrigis super la maron — iris aŭ ŝvebis aŭ kiel mi devas nomi tion. Sufiĉas diri, ke mi rapide antaŭeniĝis kaj neniel miris pri tio, ke mi povas "iri sur la akvo".

Ne daŭris longe, ĝis mi ekvidis teron ĉe la suda horizonto. Komence mi kredis vidi montojn, sed poste la formacioj pli multe aspektis kiel krutaj jutlandaj crikmontetoj. Baldaŭ mi konstatis, ke la monteta rando leviĝas en ioma distanco de la bordo, malantaŭ plata, parte erikokovrita ebena. Jen mi atingis la bordon kaj movis min antaŭen en sudokcidenta direkto, kie la grundo rapide altiĝis. Inter la erikoj aperis malgrandaj abioj; ili fariĝis pli kaj pli grandaj, kaj fine mi estis meze en arbaro, kie vojeto ĉiam kondukis min supren.

La "sonĝo" (kies precizan komencon mi ne kapablas memori) jam nun estis pli multe ol sonĝo, ĉar mi iom post iom plene konsciiĝis pri la firma realco de la pejzaĝo. Tiu, kiu ne spertis

ion similan, ne povas kompreni tion. Sed tiu sperto estis mirinde ĝojiga.

Jen la vojeto kondukis preter loko, kie dekstre aperis malgranda, herbokovrita rondaĵo inter la abioj. Tien mi eniris, kaj sentante, ke mi baldaŭ revenos al la fizika mondo kaj sekve troviĝos en mia lito, mi rompis abibranceton, dum mi pensis: "Tiun ĉi mi kunprenos kiel nerefuteblan pruvon por tiuj, kiuj obstine ne volas kredi la ekziston de alia mondo ol la ĉiutaga fizika."

En la sama momento mi malfermis la okulojn tie, kie mi sciis, ke mi devas troviĝi, nome en mia lito. Kaj la unua, kion mi faris, estis rigardi la abibranceton. Mia brako kuŝis etendiĝe ekster la lito, kaj miaj fingroj estis kunigitaj, kvazaŭ mi tenus ion. Sed mankis la branĉeto. Mi unua sento estis seniluziigo. Sed tuj poste mi ja komprenis, ke estas ne eble kunporti aĵojn el unu ekzistosfero al alia.

Sed nun mi venas al la postludo, kaj ĝi ne estas malpli interesa.

La venontan someron, sekve en 1909, mi decidis fari biciklan vojaĝon al norda Jutlando apud Skagerak, parte por viziti knatojn, parte por vidi kelkajn naturbelajn lokojn ĉe la maro, kiujn mi ankoraŭ ne vidis. Interalie mi deziris vidi la ĉarman valeton Fosdalen proksime al la fiŝista vilaĝeto Slettestrand apud Jammerbugten. De alte kuŝanta regiono ĝi serpentumas malsupren al ĉemara ebena. La vojeto, kiu sekvas la fundon de la valeteto, estas tro mallarĝa kaj kruta por permesi bicikladon. Veninte en la ebenon mi metis la biciklon en la crikojn kaj sidigis min por ripozi. Kiam mi ree levis min kaj rigardis malantaŭen, mi ekmiris rigardante ĝuste la samajn altaĵojn, kiujn mi ekzakte memoris de mia stranga sonĝekskurso la pasintan jaron. Kaj nun okazis, kiam mi tirante la biciklon daŭrigis mian iradon por trovi amikon, kiu tiun someron loĝis ĉe arbarinspektoro apud Svinklöv, ke mi "hazarde" sekvis la saman vojon, kiun mi ĉiurilate rekonis de mia nokta travivaĵo la jaron antaŭe. Nun mi sciis ankaŭ tion, ke mi baldaŭ venos al la malgranda enfermejo inter la arboj. Kaj jen! Post malmultaj

paŝoj aperis dekstre aperturo al la nomita loko, kiu estis ekzakte konforma al tiu bildo, kiun mi konservis en la memoro.

"Estas tie ĉi, kie mi prenis la abibranceton", mi diris al mi, kaj nun mi fizike faris la saman agon, kiun mi antaŭ unu jaro faris en alia sfero de ekzisto.

Multe mi pensis pri tiu enigmo. Oni eble povus supozi, ke tiu verca sonĝo estis kaŭzata de forgesita memorbildo en la subkonscio; sed — kiel mi jam diris — mi neniam antaŭe vizitis tiun regionon.

Mi venis de roka bordoregiono kaj "iris" suden trans la maron. Rigardeto sur la landkarton montras, ke norde de Slettestrand apud Skagerak troviĝas la sudnorvega bordo inter Arendal kaj Larvik. Estas konata afero, ke la sudnorvega marbordo konsistas el nudaj, ondolatigitaj rokoj kaj insuletoj — ĝuste tia pejzaĝo, kiam mi vidis. Do mia konscio iamaniere de tie movis sin trans Skagerak al Jutlando, kie ĝi "albordiĝis" en Jamberbugten. Ĉiuj geografiaj detaloj akordas. Oni povus diskuti, ĉu mi en liberigita stato faris vojaĝon sur fizikaj maro kaj tero, aŭ ĉu la viditaj pejzaĝoj estis astrala kopio de la fizikaj.

Diversaĵoj

PAC-PLANOJ LAŬ "LA KARTO", t. e. "por elekto", estas kelkpaĝa esperanta presaĵo eldonita en Usono de Campaign for World Government (Kampanjo por Mondregistaro). Tiu organizo estas fondita en 1937, kaj ĝia celo estas labori por "elfari Mondregistaron, federacian laŭ strukturo, en kiu membreco estas libervola por ĉiuj; demokratan; kun povo por devigi siajn leĝojn rekte sur la kulpan individuon — ne sur la membroŝtaton".

En la nomita presaĵo estas traktitaj planoj por krei daŭran pacon, planoj en la senco de planitaj aŭ planataj porpacaj kuniĝoj de ŝtatoj (aliancoj, federacioj, tutmonda konfederacio). La prezento de tiuj aferoj ŝajnas al mi bona kaj racia. Krome troviĝas indikoj pri bulteno eldonita de la nomita organizo kaj pri libroj pri la mondorganiza problemo.

Mi ne scias, kiom grava kaj influa estas tiu organizo Campaign for World Government, sed ĉiokaze ĝiaj klopodoj ŝajnas iri en

ĝusta direkto. Kiam tia kun ni samcela neesperanta organizo turnas sin al ni, ni devas kun ĝojo akcepti la kontakton. Per tio ni gajnas ambaŭflanke. Kunlaboro inter ni kaj popolaj movadoj kaj esperantistigo de tiuj estas eble la ĉefa metodo por grandskale funkciiĝi nian lingvon kaj por krei pacon. Tial mi rekomendas al vi nepre mendi la broŝureton. Vi ricevos ĝin kontraŭ 1 int. respondkuponon (kaj, se vi deziras, ankaŭ pluajn informojn pri la mondfederacia movado) de: Campaign for World Government, Room 505, 343 S. Dearborn St., Chicago 4, Ill., USA.

MONDA REVUO ILUSTRITA ŝajne estas provo krei revuon de bona semajnogazeta tipo, por distro kaj populara klerigo. La klopodo estas laŭdinda. Por granda amaso da esperantistoj tia gazeto certe estus bona stimulo. — En polemiko kontraŭ alia gazeto diras la redaktoro: Unue estas nia deziro, ke la gazeto kresku kaj evoluu nur pro tiu fakto, ke ĝi estas esperantogazeto. Tio estus danĝera devizo. Gazetojn fonditajn laŭ tiu koncepto ni nepre ne subtenu. Tiuj vortoj de la redaktoro evidente tamen estas nefeliĉa formulado de lia penso. — La gazeto estas 12-paĝa, formato 20 × 28 cm, plaĉa tipografio, bonaj ilustraĵoj. En la unua duonjaro de 1946 aperis 3 numeroj. La unua estis nebona kaj enhave kaj lingve, sed per la sekvintaj numeroj la gazeto pliboniĝis kaj per la lasta numero estas bone survoje al pli alta nivelo. — Prezo por 1 ekz. 1 dana kr, abono por 1946 19 int. respondkuponoj aŭ egalvaloro. Red. kaj eld. C. Pedersen, Postkesto 30, Randers, Danujo.

HEROLDE DE ESPERANTO post la 15a de okt. aperos duonmonate. Ĝi baldaŭ povu aperi semajne! Ĝi regule, ofte kaj sendepende kontaktigas nin kun la luta esperantomovado kaj ĉiuj ĝiaj kampoj, ankaŭ kun aliaj interesaj aferoj. Per ĝi ni regule kvazaŭ partoprenas tutmondan esperantokunvenon. La vigliga kaj progresiga influo de tio estas pli grava, ol ni ordinare konscias. Havebla de naciaj libroservoj aŭ de T. Jung, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando, Abonprezo 10 angl. ŝ. aŭ egalvaloro.

LABORISTA HEROLDO

La internacia semajna gazeto deziras ekhavi kontakton kun funkciantoj de laboristaj organizoj en ĉiuj landoj, kiuj scipovas Esperanton kaj kapablas verki bonstilajn artikolojn kaj raportojn pri ĉio kio koncernas laboristaron en sia lando. Same ni scias landajn perantojn por nia gazeto. Skribu pri la kondiĉoj al **Laborista Heroldo**, TURKU, p. lok. 48, Finnlando.

KOMUNIKO

La XI-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista en sia ĝenerala kunveno de la 9-a de junio 1946-a

1° esprimas la deziron ke la neŭtralaj internaciaj Esperanto-Asocioj senprokraste kaj en reciproka toleremo pristudu la eventualan reunuiĝon de la neŭtrala internacia Esperanto-Movado,

2° esprimas la esperon ke tiu de ĉiuj sopirata unueco efektiviĝos plejlaste okaze de la unua postmilita Universala Kongreso,

3° instigas ĉiujn internaciajn Esperanto-Asociojn, neŭtralajn aŭ ne-neŭtralajn, pristudi senprokraste la starigon de tutmonda Esperanto-instanco kiu reprezentu ĉiujn esperantistojn senescepte,

4° decidis komuniki tiujn deziresprimojn al la Esperanto-gazetaro por ke ili veku ĝeneralan atenton kaj simpatian.

Kun Esperantaj salutoj nome de la estraro

D.ro T. van Gindertaelen, prez.

Leopoldstraat 95-E, MECHELEN (Belg.)

AVERTO

Lau la iniciato de S-ano dr. Francisko Szilagyi, la tutmonda Esperantistaro organizas helpo-servon al la hungara esperantistaro. Ni eksciis, ke kelkaj personoj el Hungarujo je la nomo de diversaj Societoj mistifikas la bonvolan helpemon de la eksterlandaj samideanoj kaj petas sendi la helpon al ilia adreso.

Ni informas, ke laŭ la supra iniciato estas fondita ses-membra divida komitato konsistanta el S-anoj J. Baghy, P. Balkanyi, B. Bleier, K. Kalocsay, L. Kökény kaj L. Tarkony (Totsche). La sekretario de la komitato estas S-ano B. Bleier (lau adreso: Postszentlőrinc, Csákyliget, Hargitta-u. 10.), kiu sole rajtas korespondi je la nomo de la Komitato.

ATENTU! Malgranda Revuo volas doni al la legantoj kiel eble plej multe da efektiva legoteksto. Tial ĝi ne aperigas korespondanoncejn kaj povas doni nur malmulte da loko al aliaj mencioj kaj informoj.